Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 18-an de junio 2026 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Harald Rygg kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 23-an de aprilo 2026**
La protokolo de la pasinta estrara kunsido aprobiĝis.

**3. Landa kunveno 2026**
La 4-an de junio okazis sukcesaj landa kunveno kaj posta prelego de Vidar Skretting, esploristo pri islamismo en Sahelo. Bedaŭrinde la landan kunvenon ne partoprenis norvegaj novuloj.

**4. Ĉefdelegiteco kaj peranteco de UEA**
Agnar Fitjar ne plu povas esti ĉefdelegito. Ekzistas du-tri bankkontoj, uzataj kaj parte posedataj de Agnar por lia rolo kiel ĉefdelegito kaj peranto, inter ili deficita konto ĉe uea (norvega "konto de peranto"). La estraro opinias, ke pro la nunaj bonaj eblecoj individue pagi kotizojn al eksterlando peranto ne plu necesas. La estraro proponos al UEA, ke Herman Ranes estu ĉefdelegito.

**5. Nordia kunlaboro**
La lasta nordia retkunveno okazis la 17-an de junio. Ĉeestis personoj de ĉiuj landoj krom Islando, entute sep personoj. Oni raportis pri okazaĵoj kaj Esperanto-agado en ĉiu reprezentita lando.

**6. Riparlaboroj en Esperantonia**
Laŭ skriba interkonsento kun fenestroriparisto, la fenestroj ripariĝos en ĉi tiu monato (junio), post ioma kromlaboro pro konsulto kun Byantikvaren pri listeloj (la ejo estas «vernet etter plan- og bygningsloven»). La riparisto riparos la fenestrojn je anticipe interkonsentitia prezo de ĉ. 20.000 kr.

**7. Nacia biblioteko**
La nacia biblioteko sendis al NEL du eblajn versiojn de interkonsento pri publikigado de Norvega Esperantisto, el kiuj ni preferas la duan. Se ne eblos plej malfrue la 19-an de junio ricevi trian – eĉ pli prefereblan – version, Bård subskribos la duan version nome de la estraro.

**8. Retpaĝaro**
Baldaŭ necesos temporaba transiro al nova teknika solvo de nia retpaĝaro. La transiro devigos nin pripensi, ĉu aĉeti eksterajn servojn por la rearanĝo. Por tuj freŝigi la paĝaron ni ekde nun aperigos en la paĝaro unu novaĵon ĉiun duan semajnon. Por tio ni utiligos minimume du novaĵojn el ĉiu numero de Esperanto-nytt. En ĉiu estrarkunveno ni dediĉu tempon al diskuto pri aperigotaj novaĵoj.

**9. Venonta estrara interkonsiliĝo**
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 20-an de aŭgusto je 20.30.

Protokolis Marianne Lund